

Organe de l'Union des Travailleurs Espérantistes de langue française



sat-amikaro.org



Ek al venonta SAT-Amikara kongreso.

4-an ĝis 6-an aprilo 2026 Pasko Gresiljono

Ĉu vi bonvolas rezervi viajn datojn ...

Bonan jarfinon al ĉiuj

VORTO DE LA KASISTO

Antaŭ pli ol 8 jaroj mi iĝis komitatanino. Nun, alvenas tempo por cerbumi ĉu mi daŭrigas aŭ ĉu mi ĉesas tiun aktivadon. Kial ĉesi ?

Unue, ĉar kiel ĉiuj mi maljuniĝas kaj de multaj jaroj, mi estas bonvolulino en malsamaj asocioj, kun respondeco. Nun tio pezas forte kaj mi laciĝas.

Due, mi pensas ke novaj membroj povas alporti novajn ideojn.

Plie, se mi povas esti pli malpli, bonan laboristino, mi ne estas bonan decidantino. Mi estas tro pesimista por aŭdaci novaĵojn. Do, mi lasas mian lokon al iu alia kaj mi pensas ke estas tempo ke la membroj de SAT-Amikaro cerbumas al mia anstataŭigo.

Kiel kasistino, mi estas preta helpi dum unu jaro mian posteulon-inon. Mi ne lasos nek SAT-Amikaron, nek Esperanton, sed, mi pensas agi pli en mia urbo, se tio funkcias. Alia demando por mi estas ankaŭ tiun : Kial aktivi nivele de nacio, kiam mi ne kapablas agi en mia urbo ?

Solange Van Landeghem

ENHAVO - SOMMAIRE

2 - Vorto de la Kasisto

Leĝaj Informoj

3 - 5 Mi ne scias kial...

6 - 8 Les Tirailleurs sénégalais

La senegalaj Tiraljoroj

9 - 10 BILD-STRIO PRI ENERGIO

(paĝoj 31 ĝis 34)

11-12 La urbo Ampitatafika en Madagaskaro

13-14 Pour la paix contre toutes les guerres...

14 Poemo : Homoj de l'estonto mi memoras pri vi !

Biciklado : buklo de Marno

15 LA EGIPTA DETALO

Recette : TOMATES FARCIES À L'IRANIENNE

16 NENIAM PERDU ESPERON EN LA VIVO

Riceto : DOLMEH-YEH GOJEH FARANGI

De la enpaĝiganto :

Mi petas de ĉiu artikolsendonto, sendi ĝian tekston en Esperanto kun Franclingva resumo da kelkaj linioj longe (ĉirkaŭ 600 skribsignoj). Male, kiam vi sendas Franclingvan artikolon, resumu ĝin Esperantlingve, samlonge. Tio por interesi la neEsperantistojn al SAT-Amikaro.

Tofo



CPPAP n° 0322 G 86224

ISSN : 1763-1319

Directeur de la publication et Ĉefredaktanto :

Lucette ECHAPPÉ

Imprimé par :

L'Arbre aux Papiers, 72100 Le Mans

Dépôt légal à parution.

Enpaĝiganto : Jean-François BLIN

Redakt- kaj kontrol-skipo :

Patrick LAGRANGE, Anne-Marie ARGNEY

Kasistino : Solange VAN LANDEGHEM

12 rue de Charente, F-18 000

BOURGES

Revue bimestriel de SAT-Amikaro
132/134, bv Vincent-Auriol, 75013 Paris
Tel. : 0 (0 33) 9 53 50 99 58
sekreto@sat-amikaro.org
Retejo : sat-amikaro.org

Tarifoj	Be, CH Fr	Aliaj landoj
Kotizo (kun abono 60%) Cotisation (avec abonnement)	42,00 €	52,00 €
Kotizo sen abono Cotisation sans abonnement	21,00 €	26,00 €
Abono al la SAGO (nur) Abonnement à la SAGO (seul)	45,00 €	45,00 €
Junulo (malpli ol 25 jaroj), senlaborulo, kunul(in)o Jeune (moins de 25 ans), chômeur, conjoint(e)	20,00 €	25,00 €

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.

Mi ne scias kial...

Jacqueline Lépeix (SAT-ano 32199)

Mi ne scias kial, sed ,statistike la virinoj, kiuj en sia junaĝo estis viktimoj de pedofiloj, multe pli riskas, ol aliaj, poste esti seksperfortataj. Efektive mi estis seksperfortata de 2 turkoj. Ĵus post la krimo unu foriris. Sed la alia donacis al mi diskon de turka muziko kaj skribis al mi sian nomon kaj sian adreson, petante, ke mi skribu al li. Tia konduto min grave perturbis. Longe mi pripensis, sed devis alveni al la logika konkludo ke, en la kulturo de tiu viro, seksperforto estas la normala formo de la seksa rilato, do li kondutis kiel amanto kun amatino post seksa rilato.

Kiel la granda plimulto de la viktimoj mi ne raportis la krimon al la polico. Kelkajn jarojn poste mi bezonis novan restadon en psikiatrejo.

Ĝis la fino de mia vivo mi bezonas regule viziti psikiatron. De temp' al tempo iu foriras el mia urbo, ŝanĝas la laboron, ktp, do al nova psikiatro mi devas denove rakonti mian vivon. Al la nuna mi do klarigis : “Mian psikon perturbis ne tiom la seksperfortiĝo mem, kiom la reago de tiu turko. Longe mi pri tio cerbumis, kaj la cerbumado grave endanĝerigis mian psikan ekvilibron” “Kaj kio estis la konkludo de via cerbumado ?” “Se oni konsideras la tutan homaron, en ĉiuj tempoj kaj ĉiuj lokoj, perforto estas la kutima formo de la seksa rilato ; tiurilate nia okcidenta kulturo estas la plej favora al virinoj” “Sed tio estas evidento !”

En la mezepoko la katolika eklezio, difinante siajn 7 sakramentojn, proklamis du principojn :

- viro pekas, se li seksumas kun iu alia, ol la propra edzino
- la valideco de la geedziĝa sakramento baziĝas sur la libera konsento de ambaŭ gefianĉoj.

Vole nevole tio logike signifas, ke la virino devas almenaŭ unufoje diri “jes”. Poste, kompreneble, ŝi estas submetita al la “edzina devo”. Sed katolikino almenaŭ rajtas elekti sian perfortonton. Ne subtaksu la gravecon

de tiu unua paŝeto, kiun en la 21a jarcento ne jam faris ĉiuj afganoj ! Longe tiu principo restis teoria : la teatro de Molière estas plena de patroj, kiuj volas trudi al siaj filinoj neamatajn edzojn. Ĉe la protestantoj la geedziĝo ne estas sakramento, do la reformaciistoj revenis al la principo de la romia civitano sankta Paŭlo, ke la patro decidu pri la edziniĝo. Tamen, konstatante, ke post 15 jarcentoj Kristo ne jam revenis, ili ne reprenis la paŭlan konsilon, ke la edziniĝon la patro rifuzu. Poste kompreneble estis evoluo : nuntempe estas pli da egaleco inter viroj kaj virinoj en la reformaciaj kaj luteraj eklezioj, ol en la katolika (mi ne bone konas la pensmanieron de tielnomataj “evangeliaj kristanoj”). sed historie la principo, ke virino rajtas diri “jes” aŭ “ne”, devenas de la katolika teologio. En la tragedio de Shakespeare Romeo kaj Julieta geedziĝas.

Nenie mi klare vidis en la Nova Testamento la aserton, ke virino rajtas diri “jes” aŭ “ne”. Jen “en Kristo estas nek viroj nek virinoj”, jen patro rifuzu la edziniĝon de sia filino (ĉar Kristo tuj revenos), jen edzino obeu sian edzon. Miaj kristanaj amikinoj preferas la unuan el tiuj 3 citaĵoj, la ateistaj propagandistoj la lastan.

Iam iu strasburga kolemino, edzino de alĝeriano, diris al mi, ke estas en la Korano iu versiklo, laŭ kiu virino devas konsenti al sia edziniĝo. Mi demandis ŝin pri la numero aŭ la titolo de la surao, en kiu laŭ ŝi troveblas tia versiklo. “Mi ne scias precize, mi nur aŭdis, ke tiel estas” “Mi neniam trovis tian versiklon en la Korano. Ĉu la 6 jara Aĵa ne estis iom juneta por havi opinion pri sia propra edziniĝo ?” “Nu, kredeble la Profeto ŝin edzinigis antaŭ, ol estis revelaciita al Li tiu versiklo”.

Iu versiklo, kiu efektive troveblas en la 4a surao de la Korano, asertas : “ La viroj respondos pri la virinoj, ĉar Allah distingas iujn disde la aliaj, kaj ĉar la viroj disdonas por la virinoj el siaj propraĵoj. Do virtaj virinoj estas la obeemaj”.



Mi longe korespondis, en la franca, kun Baroudi, iu alĝeriano nur iom pli juna ol mi. Lia islama edukado enradikigis profunde en lia psiko la principon, ke virino ne povas fari, kion ŝi volas.

Baroudi min vizitis dufoje en Strasburgo. La duan fojon, li alvenis, dum mi estis partoprenanta en la asembleo de la francaj kvakeroj. La ŝlosilojn de mia loĝejo li iris preni ĉe E. kaj P., iu paro, kiu loĝis proksime de mia hejmo. Poste E. raportis al mi, ke ili longe babilis. Interalie E. diris, ke ili ne havas gefilojn, ĉar estas ŝi sterila. Reago de Baroudi : “Se mia edzino ne naskus infanojn, mi ŝin repudacius” Komento de E. “Mi trovas vian korespondanton tre orienta”. Efektive !

Reveninte en mia hejmo mi konstatis, ke Baroudi ŝanĝis la disponon de miaj mebloj en mia loĝejo, kaj la ordon de miaj libroj sur la bretoj de la salono. Ĉar mi estis profesia bibliotekisto, ankaŭ en mia hejmo la librojn mi ordigis laŭ mia profesia sistemo. Baroudi

tre bone sciis, kiu estas mia profesio, kaj ne havis la saman. Sed ne gravas : kiel viro, li scias pli bone ol mi, kiel mi devas ordigi miajn librojn sur miaj bretoj en mia salono en mia hejmo. La rezulto estis, ke dum monatoj mi ne plu facile retrovis libron, kiam mi ĝin serĉis. Dum la tuta restado li kondutis kiel reganta masklo en akaparota teritorio. Volonte li akaparus la

femalon, kiu vivis sur la teritorio, sed ĝojinde li sciis, ke en Francio viro ne rajtas seksumi kun virino sen ŝia konsento. Mi tamen devis lin informi, ke kisi virinon sen permeso estas seksa delikto. Li neniam komprenis, kion mi riproĉas al li, nek, kial mi lin ne plu invitos. Mi provis klarigi al li, ke lia maniero koncepti la rilatojn inter viroj kaj virinoj atencas kontraŭ la bazaj principoj de la franca respubliko. Ĉiam vane : same kiel la legantoj de La Sago, Baroudi firme kredas, ke liaj propraj moroj estas universalaj.

Eventuale Baroudi povus reveni en Francion sen mia invitilo, ĉar li havas parencojn en nia lando. Sed li tute ne intencas sin instali en Francio. MI ne scias, ĉu liaj parencoj pensas kiel li. Sed tutcerte, inter la viroj, kiuj venas por sin instali en Francio, estas iuj,

kiuj tiel pensas, kaj kredas, ke tiu pensmaniero estas universala. Tion bone scias mia psikiatro. Ĉar estas ĝuste lia laboro prizorgi iliajn viktimojn, li serĉis informojn. Li diris al mi, ke laŭ la statistikoj de la parizregiona polico, estas pli granda proporcio da seksperfortoj inter la migrantoj, ol inter la ĝenerala loĝantaro. Li aldonis : “Estas la faktoj, kaj poste estas la interpretado de la faktoj”.

NDLR : ĉu la parizregiona polico tute objektivas ??

Bedaŭrinde, same kiel ĉe SAT-Amikaro, regas ankaŭ ĉe Amnestio Internacia en Aŭvernio la dogmo, ke ĉiuj kulturoj egalas. Longe la delegito por la rilatoj kun la gazetoj estis mia bokuzo, edzo de mia kuzino H.. Dekomence tiu bokuzo klarigis al mi, ke AI ne estas taŭga loko por paroli pri seksperforto. Jes ja, ni kampanjas por afganinoj vikitmoj de seksaj krimoj en ilia lando. Sed nepre oni ne parolu en AI pri francino viktimo de turkoj en Bourg-en-Bresse.



Ricevinte la atentigon pri la nepago, mi sendis al Parizo longan leteron por klarigi tion, kion mi estas esprimanta en tiu-ĉi artikolo. Tio estis mallonge post iu silvestra nokto, dum kiu en Kolonjo migrantoj amase seksperfortis germaninojn. Sekve de tiu katastrofo la kolonja polico disdonis al la migrantoj, flugfoliojn en la germana, la turka, la araba, kaj eble aliaj lingvoj, por bone klarigi al ili la

kolonajn morojn. Iu responsulino de AI en Parizo telefonis al mi por aserti, ke efektive la artikolo, kiun mi kritikis, estis tro anĝelisma, kaj ke nek la francan policon, nek la kolonjan, nek min ŝi trovas rasista. Sekve de tiu konversacio mi ĉiujare repagis la kotizon, por resti individua membro.

Mi ne kredas, ke ĉiuj islamanoj pensas same. Male de la multaj, ĉefe francaj, membroj de “la liberpenso frakcio de SAT”, kun kiuj vane mi iam provis diskuti, mi tre bone scias, ke ne ĉiuj kristanoj pensas same. Kaj mi eĉ fidis, ke kelkaj francaj ateistoj, male de mia frato Roger, kaj male de Onfray, kapablas paroli pri io alia, ol ĉiam nur katolikismo. Konsiderante la strukturon de la katolika eklezio, mi tute ne komprenas, kiel oni povas

esti katoliko kaj respublikano. Sed mi devas konstati la fakton, ke la plimulto de la francaj katolikoj ja estas respublikanoj. Per komparo mi esperas, ke eblas inventi iun formon de islamo en akordo kun la franca kulturo. Tian islamon nia nacia televido montras en la dimanĉaj matenoj. Kiel eksa kvakero mi scias, ke kredanto ne nepre estas blinda sklavo de siaj sanktaj tekstoj. , Sed laŭdifine la eksterlandanoj ĵus alvenintaj en Francio havas alian kulturon, ol la francan.

Antaŭ nelonge iu franca knabino estis viktimo de iu marokano. Tuj la maldekstro organizis manifestaciojn en la tuta Francio. La alia membrino de SAT-Amikaro en Klermonto telefonis por min demandi, ĉu mi iros al tiu manifestacio. Mi vigle rebatis : “Ĉu vi atendas, ke mi partoprenos en manifestacio, kiu celas aserti, ke ne ekzistas francinoj seksperfortitaj de migrantoj ?” “Sed ne ĉiuj migrantoj estas seksperfortantoj !” Neniam mi diris tion ! Sed mi ja diras, ke donaci dokumentojn al ĉiuj ajn, sen ia kondiĉo, sen ia kontrolo, estas danĝero por la civitaninoj.

Ne, mi ne volas reĵeti la migrantojn en la maron. Sed mi volas ilin devigi sekvi staĝon pri niaj leĝoj kaj niaj moroj. Laŭ mia scio, kelkaj semajnoj de kursoj pri la kulturo de la lando, kie oni celas sin instalati, ne riskas iun mortigi. La turko, kiu skribis al mi sian adreson, estis trovinta bonvolemumojn por instrui al li, kiel skribi en la franca. Sed tiuj bonvolemuloj ne

pensis ke krome ili devas instrui al li, kiel kondukti kun francinoj : ili spontane imagis, ke iliaj propraj moroj estas universalaj. Sekve de la staĝo oni faru ekzamenon, kaj nur tiuj, kiuj bone komprenis la lecionojn, ricevu dokumentojn. Al la fiaskintoj oni donu tute provizoran restadpermeson, por la tempo necesa por rekomenci la kurson. Se montriĝas, ke iu viro tute ne kapablas kompreni, ke li ne rajtas seksumi kun virino, kiu krias “ne !”, NE, mi ne konsentas doni al li restadpermeson. Mi scias, ke la internacia juro devigas nin akcepti ĉiujn verajn rifuĝintojn. Sed mi ne povas imagi rifuĝinton, kiu tion ne komprenus, se iu donus al si la penon organizi tian kurson. Jes, inter la francaj kaj aliaj viroj, kiuj bone scias, ke seksperforto estas krimo, iuj tamen krimas. Tamen la

virojn, kiuj tion ne scias (ĉu renkontis mi la uunuran, kiu ekzistis ?) nepre necesas instrui.

Mi iam retmesaĝis pri tio al Marianne M., la “nesubmetita” deputitino de mia departemento. La absolute dogma respondo de ĉiaj subuloj klare montras, ke ŝia partio plene fajfas pri mia efektiva ekzisto. Ne ŝi kandidatis en mia propra balotdistrikto. Mia deputito estas la ekologiisto Nicolas B. . Mi sendis al li kopion de mia dialogo de surdulinoj kun Marianne M. . Li neniam respondis. Ĉu mi voĉdonu por partio, kiu kutimas manifestacii por aserti, ke ne ekzistas mi ? Ne, mi ne intencas voĉdoni por la ekstrema dekstro. Sed mi bone komprenas tiujn, kiujn la sistema ignorado de reala problemo ĵetas en la brakojn de gesinjoroj Le Pen kaj Bardella.

Se mi ne ekzistas, evidente mi ankaŭ ne povas repagi kotizon al SAT-Amikaro. Sed mi ne jam tute malesperas : karaj gelegantoj de La Sago, mi vin kore dankas nome de la potencialaj viktimoj, kiujn eble elsavos via racia rekonsiderado de la maldekstraj dogmoj.



Ĉiufoje, kiam Amnestio Internacia tutmonde kampanjas kontraŭ perforto al virinoj, G. iras deklari al nia regionaĵurnalo, ke tio havas nenion por fari kun la diferenco de la kulturoj : ĉie viroj same kondukas kun virinoj. Dum iu familia bankedo mi provis diskuti. MI argumentis : “Dum la

milito por la sendependiĝo de Alĝerio la kompatindaj alĝerianoj seksperfortitaj de francaj soldatoj oftege estis repudaciitaj de siaj edzoj. NI supozu, ke H. estus seksperfortita de soldataĉoj, ĉu via reago kiel edzo estus peti divorcon ?” G. kategorie rifuzis diskuti pri tia temo.

Konsekvence mi eksiĝis el ĉia aŭverniana instanco de AI, sed restis individua membro de la franca sekcio. Iam la kroniko aperigis artikolon, laŭ kiu la franca polico estas rasista, ĉar ĝi trovas necesa klarigi al la migrantoj, ke en Francio viro ne rajtas seksumi kun virino, se ŝikrias “ne !” : evidente, supozu, ke tion ili ne jam scias, estas rasismo. Tiam mi ne repagis la kotizon. ■

Les Tirailleurs sénégalais

La senegalaj Tiraljoroj

laboris pri tio : Lucette, Lucien Bresler, kaj ĉefe Patrick Lagrange

Longtemps éclipsé de la mémoire collective (en France), le massacre de Thiaroye, en décembre 1944, apparaît aujourd'hui non plus comme un enchaînement malheureux de circonstances fortuites ayant mené à un dénouement mortel mais bien comme la conséquence d'une politique raciste consciente qui a été volontairement dissimulée. L'historienne Armelle Mabon continue son combat contre l'oubli et pour la vérité. Son ouvrage Le Massacre de Thiaroye évoque non seulement l'enchaînement des faits qui ont conduit au massacre, mais également le combat scientifique et personnel de l'historienne contre la censure et l'omerta. Directement visée dans une « lettre ouverte » au Président, son travail est remis en cause publiquement par un doctorant ayant un fort soutien institutionnel. Ainsi cet ouvrage se double d'une enquête sur la « perpétuation d'un mensonge d'État » où l'on apprend notamment comment « faire taire les universitaires ».

De septembre 1939 à 1940 plus de 200 000 hommes originaires des colonies sont incorporés dans les troupes coloniales entre 1939 et 1940. Ces « soldats indigènes », comme on les appelle, représentent alors un peu plus d'un quart du total des forces de l'armée française. Les tirailleurs sénégalais sont en fait originaires de toute l'Afrique sub-saharienne. Ils paieront un lourd tribut malgré une faible présence numérique sur le sol hexagonal. Selon les chiffres officiels, sur les 40 000 tirailleurs sénégalais engagés dans les combats en métropole, près de 17 000 sont tués, disparus ou blessés au combat en 1940.

Les troupes coloniales sont massivement incorporées dès 1942 dans les Forces Françaises Libres (FFL). Elles sont de tous les combats : en Syrie et au Liban en 1942, puis à Madagascar, lors des campagnes d'Érythrée, de Crète, de Libye. Elles sont également largement employées dans les campagnes sur le sol européen. En Italie dès 1943, lors du Débarquement de Provence en août 1944, les tirailleurs sénégalais s'illustrent sur les champs de bataille, libèrent Toulon et remontent la vallée du Rhône jusqu'en Alsace à Colmar. Progressivement ces troupes sont remplacées par des ex-FFI, officiellement pour leur épargner les rigueurs de l'hiver continental. En réalité, à l'approche de la Libération, le blanchiment des troupes françaises est en marche.

Les troupes indigènes paient un lourd tribut

Dans le même temps, le gouvernement provisoire organise le retour des « soldats indigènes » faits prisonniers lors des combats de 1940. Ceux-ci, plusieurs dizaines de milliers, ont été soumis à un régime spécial. En effet, les tirailleurs prisonniers ont été enfermés dans des Frontstalag, camps

Longe forigita el la kolektiva memoro (en Francio), la masakro de Thiaroye dum decembro 1944 aspektas, hodiaŭ, ne kiel malfeliĉa sinsekvo de hazardaj eventoj kiuj kondukas al mortigaro, sed ĉefe kiel la konsekvenco de konscia rasisma politiko, kiu estis intence kaŝita. Historiistino Armelle Mabon daŭre batalas kontraŭ forgeso kaj por vero. Ŝia libro, « La Masakro de Thiaroye », rakontas ne nur la sinsekvon de eventoj, kiuj kondukis al la masakro, sed ankaŭ la sciencan kaj personan luktojn de la historiistino kontraŭ cenzuro kaj silentego. Rekte celita en « malferma letero » al la Prezidento, iu finstuda studento, forte subtenita de la institucio, publike dubis pri ŝia laboro. Tiel, tiu verko estas, plie, esploro pri la « daŭrigo de ŝtata mensogo », kie oni lernas, interalie, kiel « silentigi universitatanojn ».

De septembro 1939 ĝis 1940, la koloniaj trupoj integris pli ol 200 000 viroj el la kolonioj. Tiuj « indiĝenaj soldatoj », kiel oni nomis ilin, tiam reprezentis iom pli ol kvarono de la totalaj francaj armeaj fortoj. La senegalaj tiraljoroj



fakte venis el la tuta subsahara Afriko. Multaj el ili formortis kvankam ili ne estis en granda nombro sur la franca teritorio. Laŭ oficialaj ciferoj, el la 40 000 senegalaj tiraljoroj engaĝitaj en batalo sur metropola Francio, kvazaŭ 17 000 estis ĉu mortigitaj, ĉu malaperintaj, ĉu vunditaj en bataloj dum 1940.

La koloniaj trupoj estis amase integritaj, ekde 1942, en la Fortojn Francajn Liberajn (FFL). Ili partoprenis ĉiujn batalojn: en Sirio kaj Libano dum 1942, poste en Malagasio, en la kampanjoj de Eritreo,

Kreto kaj Libio. Krome, ili multnombro kunbatalis en la kampanjoj sur eŭropa teritorio. En Italio ekde 1943, kaj dum la Provenca Elŝipiĝo dum aŭgusto 1944, senegalaj tiraljoroj elstare batalis, liberigis Tulonon kaj antaŭeniris norden laŭ la Rodana Valo ĝis Kolmaro en Alzaco. Iom post iom, tiuj trupoj estis anstataŭigitaj de iamaj membroj de la Francaj Fortoj Internajaj (FFI), oficiale por ŝpari al ili la severan kontinentan vintron. En la realeco, dum la Liberigo alproksimiĝis, la blankigado de la francaj trupoj estis survoje.

Multe tro da mortigitoj en la indiĝenaj trupoj

Samtempe, la provizora registaro organizis la revenon de la « indiĝenaj soldatoj » kaptitaj ekde la bataloj de 1940. Tiuj, pluraj dekoj da miloj, estis submetitaj al speciala reĝimo. Efektive, la kaptitaj tiraljoroj estis enŝlositaj en « Frontstalag »-oj, militkaptitejoj

de prisonniers établis en dehors du Reich et gardés par des officiers français !

Les soldats indigènes libérés après quatre années de captivité sont aussitôt démobilisés avant leur retour dans les colonies. Dès le mois d'octobre 1944, ils se voient appliquer un régime particulier sur demande du général Ingold, directeur des troupes coloniales. Durant leur séjour sur les sols métropolitains, ils sont « réunis », d'autres diront enfermés, dans des « centres de transit des troupes indigènes coloniales (CTTIC) » au sein desquels ces soldats sont « séparés par "race" ». La ségrégation raciale est non seulement spatiale mais également financière : les rappels de solde ne sont pas entièrement versés, voire pas du tout.

Le sort de ces troupes est relayé dans la presse : un article de L'Aube début octobre évoque la situation catastrophique et le dénuement de ces soldats dans l'impossibilité d'acheter quoi que ce soit car leur rappel de solde n'est pas réglé. L'administration se montre inflexible et note la dégradation du climat au sein des CTTIC où règne l'indiscipline due à « l'état délétère et les mauvais comportements des tirailleurs ».

Face aux revendications des soldats coloniaux démobilisés, les autorités s'inquiètent. Le ministre des Colonies fait part au gouverneur de l'Afrique-Occidentale française (AOF) de ses craintes concernant une « convergence » des revendications sur des soldes non payées et les revendications indépendantistes. Le retour à Dakar de ces soldats mécontents est tout particulièrement craint. C'est dans ce climat que s'organise le rapatriement de quelques 2 000 anciens prisonniers tirailleurs sénégalais vers Dakar.



Le 5 novembre, une partie des anciens tirailleurs refuse d'embarquer à Morlaix avant que leur solde ne leur soit entièrement versée. Ces 315 insoumis échappent ainsi au massacre à venir. De même, lors de l'escale à Casablanca, ce sont 400 insoumis cette fois-ci qui refusent de remonter à bord. L'ambiance est lourde en arrivant à Dakar le 21 novembre où quelque 1 200 à 1 300 rapatriés débarquent direction la caserne de Thiaroye dans la banlieue de Dakar.

Chronique d'un massacre annoncé

Le récit officiel convoque tous les préjugés racistes pour justifier l'« opération de maintien de l'ordre ».

L'insubordination des rapatriés est due au fait qu'après quatre ans de captivité ceux-ci sont désormais des « désaxés »]. L'autre cause de cette insubordination et du non-respect dû

konstruitaj ekster la Germana Regno kaj prigarditaj de francaj oficiroj !

La indiĝenaj soldatoj, liberigitaj post kvar jaroj da kaptiteco, estis tuj malmobilizitaj antaŭ ol reveni al la kolonioj. Ekde oktobro 1944, la Generalo Ingold, direktoro de la koloniaj trupoj, petis ke ili estu aparte pritraktotaj. Dum ilia ĉeesto en metropola teritorio, ili estis « kunigitaj » - iuj dirus enŝlositaj - en « Centroj Transiraj por Trupoj Indiĝenaj Koloniaj (CTTIC) », kie tiuj soldatoj estis « apartigitaj laŭ raso ». Rasa apartigo estis ne nur spaca sed ankaŭ financa: la salajra finpago estis ne entute pagita, foje tute ne.

Gazetoj informis pri la vivkondiĉoj de tiuj soldatoj: artikolo en L'Aube, komence de oktobro, priskribis la katastrofajn situacion kaj malriĉecon de tiuj soldatoj, kiuj havis nenian eblecon aĉeti ion ajn pro nepago de ilia salajra finpago. La administracio sintenis neŝanĝeble kaj tamen rimarkis ke la etoso difektiĝis sine de la CTTIC, kie regis maldisciplino pro la « kaĉiĝantaj kondiĉoj kaj aĉaj kondutoj de la tiraljoroj ».

Pro la postuloj de malmobilizitaj koloniaj soldatoj, la aŭtoritatoj maltrankviliĝis. La Ministro pri Kolonioj informis la Guberniestron de Afriko-Okcidenta Franca (AOF) : ili timis ke la postuloj pri kaj nepagitaj salajroj kaj sendependecoj « konverĝu ». La reiro al Dakaro de tiuj malkontentaj soldatoj estis aparte teruriga. En tia etoso, estis organizita la repatriigo de pli malpli 2 000 iamaj senegalaj kaptitaj tiraljoroj al Dakaro.

La 5-an de novembro, en Morlaizo (Morlaix), kelkaj el la iamaj tiraljoroj postulis ke ili enŝipiĝu nur post la plena pago de sia salajro. Tiuj 315 rezistemuloj tiel eskapis al la estonta masakro. Same, dum la halto en Kazablanko, pliaj 400 malobeantoj rifuzis reenŝipiĝi. La etoso estis pezega je la alveno en Dakaro la 21-an de novembro, kie pli malpli 1 200 ĝis 1 300 repatriitoj elŝipiĝis rekte al la kazerno de Thiaroye en la ĉirkaŭurbo de Dakaro.

Kroniko de Antaŭanoncita Masakro

La oficiala rakonto tavolas ĉiujn rasismajn antaŭjuĝojn por pravigi la « polican agadon por konservi ordon ».

La malobeado de la repatriitoj praviĝus ĉar, post kvar jaroj da kaptiteco, ili iĝus « mense fuŝitaj ». La alia kaŭzo de tiu malobeado kaj manko de respekto al

à leurs officiers tient à la « propagande nationaliste allemande dénonçant la colonisation » subie durant leur captivité. Le rabaissement de ces anciens soldats coloniaux va même jusqu'à nier le fait qu'une partie s'est engagée dans la Résistance, les décrivant comme incapables d'en comprendre les enjeux.

Les revendications, de ceux qui sont considérés dès lors comme des mutins, sont le paiement des rappels de solde en plus de diverses primes dues. Les soldats démobilisés refusent de quitter la caserne tant que les sommes ne leur sont pas versées. Certains d'entre eux osent même bloquer le véhicule du chef d'état-major. C'en est de trop pour les autorités militaires. Face à cet acte de rébellion, il est décidé de frapper un grand coup et d'organiser une « démonstration de force ».

Une logique coloniale

Une intervention est programmée pour le 1er décembre au matin. Ordre est donné aux rapatriés de se rassembler sur l'esplanade. La thèse officielle parle de meneurs ayant tenté de prendre d'assaut un half-track et d'un sous-officier blessé. Devant la situation qui soi-disant menaçait de dégénérer, l'ordre est donné d'ouvrir le feu.

Le bilan officiel fait état de 35 morts et 35 blessés. Par ailleurs, 48 « meneurs » sont arrêtés et 34 jugés écopent jusqu'à dix ans de peine de prison : ils seront tous amnistiés entre 1946 et 1947. Le gouverneur général de l'AOF, Pierre Cournarie, par ailleurs compagnon de la Libération, justifie ce massacre comme étant « infiniment regrettable mais malheureusement indispensable ».



Nul doute que cette opération préméditée a été pensée comme devant servir d'avertissement à d'éventuels futurs insoumis. La France n'entend pas assouplir le joug sous lequel elle tient ses colonies, toujours maintenues à un état de subordination et d'infériorité.

Le nombre total de morts ce jour-là dans le camp de Thiaroye est inconnu, mais plusieurs historiens et historiennes avancent qu'il y en aurait eu plus d'une centaine. Les fouilles nécessaires à l'exhumation des corps n'ont pas (encore) été réalisées alors que la présence de fosses communes est reconnue au plus haut niveau de l'état-major français. Le massacre de Thiaroye annonce ceux encore plus meurtriers de Sétif, Guelma et Kherrata le 8 mai 1945 en Algérie et ceux survenus lors de l'insurrection malgache en 1947-1948. Autant d'épisodes de nos histoires communes qui ne rentrent pas dans le grand « roman national ». ■

iliaj oficiroj kuŝus en la « germana naciisma propagando kiu kondamnas koloniadon » ade aŭdita dum ilia kaptiteco. La malestimigo de tiuj iamaj koloniaj soldatoj iras ĝisneado de iliaj engaĝigo en la Rezisto, ĉar konsideritaj nekapablaj kompreni ĝian celon.

La postuloj, de tiuj nun konsiderataj ribelantoj, estis la pago de salajra finpago aldone al diversaj ŝuldataj gratifikoj. La malmobilizitaj soldatoj rifuzis forlasi la kazernon ĝis kiam tiuj sumoj estu pagitaj. Iuj el ili eĉ kuraĝis bloki la veturilon de la Stabestro. Tio estis la troa envento por la militaj aŭtoritatoj. Pro tiu ribela ago, oni decidis fortege agi kaj organizi « demonstran forton ».

Kolonia logiko

Agado estas planita por la mateno de la 1-a de decembro. La repatriitaj soldatoj estis trude kunigitaj sur la esplanado. La oficiala versio deklaris, ke ribelestroj provis sturmi duontrakan aŭtomobilon kaj ke suboficiro estis vundita. Pro tiu situacio, kiu supozeble minacis plikaĉigi, oni ordonis ekpafadi.

La oficiala nombro estis 35 mortitoj kaj 35 vunditoj. Krome, 48 « ribelestroj » estis arestitaj, kaj 34 estis juĝitaj kaj kondamnitaj ĝis dek jaroj da malliberejo; ĉiuj estis amnestiitaj inter 1946 kaj 1947. La Ĝenerala Guberniestro de Afriko Okcidenta Franca, Pierre Cournarie, kunbatalanto de la Liberigo, pravigis tiun masakron kiel « senlime bedaŭrinda sed bedaŭrinde necesan ».

Sendube, ĉi tiu antaŭpensita agado estis konstruita por malkuraĝigi estontajn neobeemulojn. Francio tute ne intencis malstreĉi la jugon, sub kiu ĝi daŭre premis siajn koloniojn en submetitajn kaj malsuperecajn statojn.

Dum tiu tago en Thiaroye, la vera nombro de mortigitoj ne estas konata, sed pluraj gehistoriistoj sugestas, ke estis pli ol cent. La elfosadoj necesaj por eltombigi la kadavrojn ne (ankoraŭ) estis faritaj, kvankam la ĉeesto de amastombegoj estas agnoskita je la plej alta nivelo de la franca Stabo. La masakro de Thiaroye antaŭanoncis plej mortigajn masakrojn : tiujn de Sétif, de Guelma kaj de Kherrata la 8-an de majo 1945 en Alĝerio, kaj tiujn dum la malagasa ribelo de 1947-1948. Tiom da epizodoj el nia komuna historio, kiuj tute ne kongruas kun la granda « nacia rakonto ». ■

Tamen, mi legas, ke estas multaj fuziaj reakcioj, multaj nukleaj rearanĝoj, kiuj ne produktas liberajn neŭtronojn

Litio 7 + Hidrogeno 1 (malpeza) produktas 2 Heliumojn 4 ($7 + 1 = 2 \times 4$)

Boro 11 + Hidrogeno 1 produktas 3 Heliumojn 4 ($11 + 1 = 3 \times 4$)

La unua havas ekbruligan temperaturon de 500 Milionoj da gradoj. Kaj la dua, preskaŭ 1 miliardo da gradoj

Hmm...Kompreneble... Praktike, kiel kunigi nukleojn?

En la Suna koro, tio okazas malrapide, je temperaturo de nur 15 milionoj da gradoj

Jes. Por krei nuklean "Fajron", necesas 150 milionoj da gradoj, por ke la reakcioj okazu, ni diros, dum tempo de proksimume unu sekundo

Do, la Suno estas nur ardaĵo...



Eble ankaŭ eblas "bruligi" miksaĵon de nukleoj

Se oni varmigas ilin je alta temperatura



DEŬTERIO



TRICIO




HELIUMO

Eblas reakciigi DEŬTERION kaj TRICION, kiuj estas du specoj de PEZA HIDROGENO (la nukleo de malpeza hidrogeno enhavas nur unu protonon P). La nukleoj de tiuj IZOTOPOJ nur malsamas pro la nombro de neŭtronoj. La miksaĵo Deŭterio-Tricio emas produkti Heliumon.

GRANDA DIABLA BALO

Jen gasero de PEZA HIDROGENO, 50% da DEŬTERIO, 50% da TRICIO. Je kutima temperatura, la ELEKTRONOJ rondiras ĉirkaŭ la nukleoj kaj permesas la molekulaĵajn ligojn (ligante duope la nukleojn).




Deŭteria molekulo

Tricia molekulo 31



Nu, FUZIO estas tiel polua kiel FISIO, ĉar la fuziaj neŭtronoj ŝanĝas la najbarajn atomojn en radioaktivajn atomojn

Tamen, oni provas sorbi tiujn neŭtronojn per Litio 6, produktante Heliumon 4 kaj Trition 3.



Alidirekte, la litia 6 envolaĵo agas kiel "fekunda" materialo. Laŭsupoze, ĉi tiu reakcio produktas "fisian brulaĵon", Tritio 3

Jes, fuzia reaktoro similas al regenera reaktoro. Kaj estas trafe, ĉar Tritio ne estas stabila (*), ĝi ne ekzistas nature.



(*) La duonvivaĵo de Tritio valoras nur 12 jarojn

33

Poste, la bala ritmo vere iĝas diablega. Molekuloj rompiĝas (disiĝo) kaj la elektronoj-abeloj rondiras nur ĉirkaŭ unu sola nukleo

JE ĈIRKAŬ TRI MIL GRADOJ: Ne eblas orbiti ĉirkaŭ tiuj nukleoj, ili ade moviĝas



Jes, tio iĝas infero. Mi rezignas...

La varma gaso tiam iĝas supo el nukleoj kaj liberaj elektronoj, VARMA PLASMO.

Varmigu, Amiko, Varmigu!

Ĉu vi scias? Se ni estus kvar, estus pli bone

Ĉu vi kredas?

Mi sentas ruzaĵon en tio

Jes, je tiu temperaturo, estus pli STABILE



Hej, atendu! $3 + 2 = 5$, kaj Heliumo havas 4 nukleonojn. Ĉu ne?

Ekde 150 MILIONOJ DA GRADOJ (EKBRULIGA TEMPERATURO), io okazas

Ili estas ekscititaj!

32

La urbo Ampitatafika en Madagaskaro

Henriel

